

& La simio kaj la delfeno:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 372 paŝoj dum 5 minutoj. Poemon verkab Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956) baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

(#Melodio:

<:31> (/mi mi dolre mi mi mido re fa; mimimi mimi mido re fa;

(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do)

)×12)+

(&Strofoj:

'1 /Simio2n havis homo foje, ; tre ofte kun ĝi ludis ĝoje,

(×: **En la ĉen'** ; **Dancu nun trankvile ; Ĉiuj ni trankvilas ; Jen en amika ĉen'** ; **Dancu nun trankvile.**)

'2 ĝin por amuzo kaj plezuro ; kunportis eĉ dum marveturo.

'3 Sed jen, tempesto eksovaĝis. ; La ŝipo dronis. Homoj naĝis.

'4 Dum la simio pene provis ; elnaĝi, ĝin delfeno trovis,

'5 kaj, ĉar ĝi homo ĝin rigardis, ; bonvole ĝian vivon gardis,

'6 surdorsen prenis ĝin por porto ; al seka kaj sekura bordo.

'7 Nu, kiam ili al haveno ; Pireo (rodo de Atheno)

'8 alvenis, la delfen' scivolis: ; "Ĉu Athenano?" "Jes!" — parolis

'9 tre fanfarone la simio, — ; "eĉ el plej nobla familio!"

'10 "Do, vi Pireon konas bone?" ; "Pireon? Certe, kiel do ne?

'11 Li estas ja al mi tre kara ; amiko, plej familiara!"

'12 Ko[lere] [pro l' men]sogo, la delfeno ; droni[gis la a]mikon de haveno.)